

eLIBRO

Viktor Galeski

Kalejdoskopopo

Poemaro

I N K O

Viktor Galeski
KALEJDOSKOPO

Poemaro

Tradukis en Esperanton:
Nikola Uzunov

Makedonaj redaktintoj:

Boris Krlevski

Danilo Kocevski

Vasile Dimeski

La presitan libron eldonis

Esperanto societo "La Progreso",
Prilep 1999. (ISBN 9989-712-88-3)

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-146-1

inko@omnibus.se

http://www.omnibus.se/inko

APRILIO 2002

ANTAŬPAROLO

En tiu mondo, motivoriĉa, Galeski eldiris ne nur sian kontraŭstaron kaj proteston, ne sur sian rezignacian senton pro la malfeliĉa sorto, sed li ankaŭ provis iom malfermi aŭ almenaŭ tuŝi la sekretajn pordojn de granda provoko. Tial iuj liaj konstatoj ne prezentas tion en ĝia ekstrema formo, sed starigas novajn dilemojn kaj la poemo ĉe sia fino en sintezita mesaĝo sin turnas:

*Dio,
undulgu min!
Mi kaj Vi,
solaj,
nun,
al kiu ni ĝoju?*

Post tia ĉi konscio, apokalipseca laŭ sia naturo, Galeski en "Post la Diluvo" malfermas novajn etikajn kaj ekzistad-problemojn, ĉar eble malgraŭ proksima al sia Kreinto kaj senmorto, sed disduigita kaj kondamnita esti sola, esti la ununura postvivinta ŝipromptulo, la homo tuj post sia pereco transformiĝas en sian senvivecan, fosilian formon. Soleca kiel stumpo kaj disduigita pro sia naturo, por li ne ekzistas motivoj esti feliĉa.

Tre intima laŭ sia forto de senreviĝo estas ankaŭ la poemo "Mia filino", en kiu la pereco de la sonĝo estas pereco ankaŭ de la sonĝanto, de la homo, kiun sole la kredo subtenas.

Tiel en kvindeko da poemoj la poeto iom post iom malkovras sin al ni kaj plejofte kvankam per konciza, reduktita poezia formo, li sukcesas atingi ĝis la fundo de la grandaj mondoj, ĝis la fundo de la homa animo kaj ĝis la fluoj de la konscio.

Vasile Dimeski

Liaj versoj estas netrudita, subtila larmoviŝado ĉe la limo inter tio, kion oni sonĝas kaj travivas. En ili ekzistas adoleska evidente lirika duonsveno pro paŝado sur tiu rando.

La realo milde eniras la nerealajn limojn de la sonĝo kaj male, la sonĝo ĉiam havas ian reale travivitan inicon. En tiu interspaco de la sonĝo kaj la realo Galeski enteksas siajn poeziajn fadenojn: ili estas reflektajtoj kaj emoci-lirikaj fragmentoj pri amo, serĉado de senco en la vivo, kaj multfoje intertuŝado kun la morto kaj la sombraj flankoj de la vivo.

La verso de Galeski estas konciza, elipsa, delikate kaj lirike subombrita, tamen la poeta penso estas pura kaj fojfoje filozofie sentencoplena, kaj la travivaĵo estas spontanea kaj netrudita

Danilo Kocevski

La poezio, diras la kritikistoj, estas la plej forta esprimo de la sentoj, ununura maniero transdoni ĉion, kio estas kaŝita profunde en la koro, priskribi la spiri-tostaton.

Ĝuste en tio nin konvinkas ankaŭ la unua poemaro de la juna poeto Viktor Galeski — **Kalejdoskop**o.

Oni devas rimarki, ke tiuj ĉi poeziaĵoj enportas certajn novaĵojn en nian makedonan poezion.

Luj el la poeziaĵoj estas koncizaj kaj post ilia trailego nin instigas al meditado. En la temoj estas multvarieco, oni sen-

tas, ke la aŭtoro kantas pri ĉio, kio lin ĉirkaŭas kaj kion li portas profunde kaŝitan en sia delikata junula koro.

La versoj estas modernaj, sen rimoj, por ke li povu esprimi pli bone siajn sentojn. En lia poezio estas granda abundo de metaforoj, la lingvo estas pure makedona, sed estas ankaŭ tendenco al novaj forĝitaĵoj.

La poemaro de Viktor Galeski **Kalejdoskopo** estas bela, moderna poezio.

Prof. Boris Krlevski

1. IO PRETERPISIS MIN

TROVAĴO

*Ĉi-matene
en la vitrino de l'vendejo
por ludiloj
mi vidis
forgesitan
maljunulon.*

IO PRETERPISIS MIN

*Ne revenos
la infano,
kiu nokte revis,
nek denove mevoj
forflugados timigitaj
de la paŝoj liaj.
La tempo delonge forviŝis
la piedspurojn sur la sablo.
La lago ne rekoneblas,
kaj lace sin trenas la ondoj
sub la ĉielo.
Forflugas la mevoj,
nur mi daŭre
ĉi tie
staras
ĉiam.*

SPEGULO

*Renkontiĝis ni
es la spegulo
kaj timo morta
kaptis min,
pro la haroj grizaj,
pro la rigardo
eltreviĝinta,
deprimita.*

*Per mia koro
la spiron fian
de la timo
mi gustumis.
Dum rigardis fikse kaj senhonte
la vizaĝo min,
mi ne sentis min kuraĝa,
nek memfida.
En la spegulo lasis mi
la vizaĝon
sufokiĝi,
kaj mi decidis
novan komenci
vicon.*

PRIPENSITA ŜILDO "PEGAZO KAJ INFANO"

*Ĉiunokte — saman bildon,
se mi fermas la okulojn
mi ekrajdas Pegazon
al la steloj ekflugi
kaj konata voĉ' infana
vokas min
reveni.*

*Kaj senfine tiel ...
ĉiam tiel finiĝis ĉio.
Heziteme
nek surtere,
nek ĉiele
ŝvebis mi.
Tio tedis
al mia amik' flugilhava
kaj ĝi lasis min
vagi sola piede
tra l'mondo.
De l'infano restis eĉ ne spuro.
Ĉiunokte sur la ĉielo*

*vidas mi Pegazon.
Eble mi renkontos ilin ambaŭ
ĉe la vivofino.*

INFANECO

*En la ŝirmejo de mia infaneco
mi serĉas la kialon
de l'ekzisto.*

*Timanta
ĉion nekonatan
mi tremas en la sino
de patrino mia.*

*En la songoj
ĉio estas pli kvieta kaj pli hela.
Ree tremas mi pro timo,
ke iu aŭto rapida
ne surveturu la ŝirmejon,
kaj mi restu sola
sen infaneco.*

PRINTEMPO

*Hodiaŭ
sub fenestro mia faris neston
hirundo.*

*La infanoj kuris
ludi en la polvo.*

*Mi priskribas sur papero
plorante la vivon ...*

*En la ĉielo
junhirundoj ludas
kun la suno.*

*Bruligitaj falas
miaj larmoj
sur la pensojn,
pezaj rememoroj
tristaj ...*

*Ĉu mi ĝisatendos ilin
ankaŭ sekvontjare.*

FLUGO

*Sigelu vian manplaton
en tiun animon
kaj donu ĝin al la birdo
fluganta
al suno.
Elĵetu la kolororiĉon
de l'vivo
ŝtelitan de la
ĉielarko,
kaj ĉe l'fino ĝia
ni serĉu la feliĉon.*

*Pentru
la mortflugon
de l'planedoj
kaj metu la nigron
prikanti la vivon.
Perdiĝinta infano
sonĝas
la matenon tagiĝontan,
en la sombro*

*mia stelo finas sian flugon
ridante ebrie
en mia animo.*

NIGRAJ BIRDOJ

*Birdoj nigraj
elbekis mian nomon,
kaj mia animo
ne povas trovi
sian domon
en la tombejo.*

INFANOJ

*Hundoj — vaguloj
alportis la neĝon
por la infanoj,
ke realiĝu ilia songo.*

*Zorgoplenaj gepatroj
forpelis ilin de la stratoj,
la neĝo restis.
La piedpremitan songon
desegnas la frosto
sur la fenestroj.*

SAMSPECAJ ANIMOJ

*Oni kunvenis
sub la lumon de kandeloj
por interpreti la VIVON.
En la mallumo
restis pendi
solece
demando:
"Ĉu vi aŭdas la venton,
kiun mi vidas?"*

IDOLANA KREDO

*Mi la tutan vivon
KREDIS,
ke iun tagon
la feliĉo
al mi ekridetos.
Ĉio preterpasis,
ĉio malatentis min,
februaro
28-taga restis.*

MIA FILINO

*Longan tempon
mi elpensadis nomojn
por mia filin' nenaskita.
Ĉi-vespere
mi damnas la songon,
kiu ne avertis ĝustatempe min,
ke oni malpermesis
al ĝi naski.*

MI KAJ ĜI

*Ne demandu min — KIAL?
Mi scias nur,
ke frumatene,
antaŭ la sunapero,
oni diris al mi,
ke meze de la kampo,
en bonodoroj,
eble malantaŭ la monto,
absorbiĝinta
atendas la vivo.*

*Ŝvitinte pro kurado
mi spiron ne havas
pro sufero ekplori.*

POST LA DILUVO

*Dio,
indulgu min!
Mi kaj Vi
solaj
nun,
al kiu ni ĝoju?*

LUNO

*Mi tiom enpensigis,
ke forgesis
mian maŝon stringitan
ĉirkaŭ la kolo.
Ĉi-matene mi legis en ĵurnalo,
ke miaj songoj
sin pendumis antaŭ la pordo
de promesoj elreviĝintaj.*

*Hieraŭ estis plenluno
kaj mi diris al mi:
tempo venis
por morti.*

MALBONA KOMERCISTO

*Ĉiutage
sur la bazar' brokanta
mi vendas malkare
la ĉagrenon.
Strange,
neniu
ĝis nun demandis min
pri la prezo.*

NEFINDIRITA

*Volus mi
kanton
verki
pri l'doloro.
Sed mi
neniel
ĝin vidas
de malproksime.*

REKVIEMO

*Silentigu
la sonorilojn,
kiuj sonoras pri mi,
ke mia animo
trovu trankvilon.
En la mallumo
silentigu
la sonorilojn,
mi ĉi-vespere entombigis
la songojn
en la okulojn.*

JAM VIDITA

*Oni enterigis min
sen konfeso.*

*Kaj kvar popoj — ne venis,
kaj "Amen" — neniu diris,
kaj eĉ unu larmo ne gutis
sur min,
kaj neniu rememoris
pri mi,
kaj miajn okulojn oni ne fermis.
Sed ankoraŭ la tero ne kutimiĝis
kun mi,
sur mi
palacojn oni konstruis
de songoj.*

*Oni enterigis
simple min
sen konfeso.*

ANTAŬDORMA REZONADO

*La kolomboj
timigite bruflugis
kaj timigis mian sonĝon.
Vane
mi ĉiumatene nutras ilin.
Sur la fenestro
la frosto pentris
ies fremdajn sopirojn.*

PROMESO

*Panjo,
gardu miajn songojn
dum elkreskos mi.
Apenaŭ tiam mi povos
la sunon
per manoj kapti.*

ĈIELARKO

*La teksitajn songojn
mi sternas
en la okulojn.
Miaj songoj
ĉielarkon similas,
tiel disverŝitaj
dum la noktoj.*

OKULOJ

*Mi damnis
damniton
por ĉiam
en momento konfuza.
De l'okuloj
en koro restintaj
ne povas mi kaŝi min
nokte.*

MATENO

*Ĉi-matene
la neĝo surprizis
miajn paŝojn
forĝesitajn
en songo.
Nun mi
ne scias
vespere,
sur kiu vojo
reveni
al vi.*

SE MI EKIRUS ĈI-NOKTE

*Birdoj malbonaŭguraj
timigis mian songon
kaj mi ne scias
ĉu mi iam trovos
kaj ĝin revenigos.
Ĉi-matene
aŭguristinoj
antaŭdiris mian morton.
Se mi ekirus ĉi-nokte
pli reveni
ne atendu min.*

KONFESO

*La lastajn erojn
falintajn el la songo
mi disdonis al la birdoj.
Atendadon
de l'okuloj por ĉiam mi forĵetis
sur la straton,
nun por ĝi sin mordas hundoj.
Mian kredon
mi forlasis en la frosto
sur la bushaltejo,
forĝesita de la amo ...*

*Absolvu min,
Dio,
ke mi lasis nenion
por soluloj.*

2. NOKTO SEN RIPOZO

NOKTO SEN RIPOZO

*Nokto senripoza
mian pardon frapas.
Mi ne scias, ĉu necesas,
aŭ denove nepre devas
en songo nova
inter balkonoj ĉielaj
al via vizaĝo
pezajn pordojn malfermi.*

*Ankoraŭ unu nokt' senripoza
de miaj pensoj min embuskas
tuj post kiam mi vin vidis.
Kaj ne estas kion kaŝi tie ĉi
de la luno, kiu tra l'fenestro ŝtelobservas.
Ne sciate — kiel, ne sciate — kial
obstine mi batalas
kontraŭ la duondormon,
se mi volas, se mi devas
dorme senripoze
kiel araneo — reton,
el la songo — songon
kiel ĉiun nokton*

*ankaŭ ĉi-nokte
fari
de l'komenco.*

AMO

*Mi amas vin, Ikamon',
pli ol mian solecon,
ho, kiel trompa estas
mia amo.*

*Same kiel konko — sian perlon
vi min amas.
Kiom mistera estas
via animo,
Ikamon'.*

*Mi atendas ĝis la tempo
vin elĵetos
el la profundo de via fiereco.
Sur la bordo
ĉiu grajno estas mi,
ĉiu konko estas vi,
en ni estas nia amo.*

*Ne permesu
al perloĉasistoj min kapti.
Premu min forte*

*en vin
ĝis neniigo.
Sur la bordo
konk' aperta
forĵetita
kuŝas.*

VIRINO

*Ŝi min bruligis,
frenezigis,
rekreis,
feliĉigis,
senluzigis,
elkraĉis,
perfidis,
forĝesis,
enterigis.*

*Kaj ŝi
estis nur
simpla
VIRINO.*

ĜOKONDA

*La virin' elpensita de mi
ne volis je la kvara matene
konversacii kun mi pri l'estonto.
Dum ni amoris
ŝi estis
pli bela... ege pli bela
ol multaj aliaj
antaŭ ŝi
elpensitaj.
Ŝi ĉiam
ridetis mistere
kiel Mona Liza
kaj volis,
ke mi donacu al ŝi
la tempon
sur mia manplat'
kolektitan.*

KANDELO

*Malamis mi ilin,
kiam ili diris
pri vi,
ke multaj viroj antaŭ mi
konsideris vin
voluptama,
kaj ke ĉe vi estis virgaj
nur la okuloj.*

*Mi malamis vin.
Hodiaŭ
mi neniun pli malamas.
Mi aŭskultas la kunulojn
kiel ili siajn infanojn laŭdas.
Legas mi anoncojn
pri laborofertoj.
Spektas filmojn
dufoje en semajno.
Teon mi trinkas
antaŭ enlitiĝo.
Tagoj feliĉaj
apud mi malofte haltas,*

*ĉiuj ili min preterpasas ...
Hodiaŭ
mi malamas min mem,
ĉar ĝis nun forgesi vin
mi ne povas.*

MUROJ

*La morto tiel ne timigis min
kiel min timigis vizaĝo
rigardanta min
el la spegulo.*

*Kaj nenio ĉagrenigis min
pli ol viaj paŝoj,
trakurintaj mian sonĝon.
Tra l'fenestro
neonreklamo HOTELO
ne sciate por kioma fojo
lasas spurojn sur la muron.*

*Mi malŝatas
hotelĉambrojn
kun speguloj,
aranĝitaj litoj
kaj solecaj ombroj
forgesitaj
sur la muroj.*

HAIKU – PENSOJ, TROVITAJ EN SKOPJE

1.

*Dum ni kaptitaj de la frosto rezonadis,
la tago ŝtelis niajn songojn.
Nun la vento vane lulas la foliojn
antaŭ la okuloj.*

2.

*Urbaj aŭtobusoj
disportis vian vizaĝon ĉien,
kaj mi ne povas rememori
kial ni ĉiunokte vin songis
kaj poste vin malbenis.*

3.

*La pluvo malsekigis min,
la vento min frostigis,
tiam vi
simile hirundo
en mian songon
enflugis.*

TEMPO

*Denove mi solas,
la mallumo rodas la silenton.
Sur la muro
disaj ombroj dancas.
En malplena glaso
restas fiksita la rigardo
al la fundo.
Min doloras la animo,
ĉar ĉio estas
kiel pasintjare.
Denove
por miliona fojo
sola
en mallumo
io rodas
la junecon.*

MI NE KREDAS SONGÔJN

*Ĉi-vespere
la soleco
min enfosis
inter la murojn kaj
nenio de mi restis.
La tempo
lacigite
sin sternis sur la liton
post freneza konkurado
kun la pensoj.*

*El la ricevilo,
piansonato
kaj ĝis doloro
klarigitaj
reviviĝas
pensoj.*

*Mi ne kredas
songôjn, ĉar ĝis nun
mi ne sukcesis
tuŝi vian voĉon,*

*kiu ŝajne serpento
ĉiam trairas inter
miaj fingroj.
Antaŭ la vekigo
mi ĉiam
sola
restas.*

EĈ LA SONGŔOJ KONTRAŬSTARIS MIN

*Dum ĉi-nokto
eĉ la songŕoj kontraŭstaris min.
Ĉi-matene en izolo,
inter la anĝeloj furiozaj,
mi atendas la koleron
de l'ĉielo.*

*Fajraj pluvoj
stratojn forviŝantaj
nun forlavu miajn pekojn
en la pensoj naskiĝantaj.
Mia tombo estas vaka,
la anim' delonge jam forflugis
kun la ventoj
serĉi vin tra l'mondo.
Kaj l'anĝelo nigra estas nun venkita
per la am' ŝtelita
de la cignoj.*

3. SUBLIMA AMO

LOĜRAJTO

Mia animo

nun lacas

kaj eble ĝi trovos

trankvilon — en la tombejo,

se la mallum' ĝin akceptus

kaj konsentiĝus

la tristaj loĝantoj

de la Infer'.

SOLECA KANTO

*Ne permesu,
ke mian rigardon
oni katenu
dum la dormo venas
sur la lipojn de l'kantistoj,
kaj mi
sola
restas
kun la tristo.*

SUNSUBIRO

*La tago sin portas
al la pasinto,
jen, malrapide foriras.
Kreskas ĉiele
nubo majesta
kaj ŝajne galero navigas.
Finfine
ĉio, ja, samas,
morto kvieta
kun nove venanta naskiĝo.*

SE VI RAPIDUS

*Se vi rapidus,
vi eble sikcesus,
sed sciu,
ne estas vojo returna.
Kaj longas la vojo
teruras la songô,
kiun mi songâs.
Senĉese vin
persekutas la timo
pro l'ostoj disŝutitaj
apud la vojo.*

*Se vi rapidus
antaŭ la suno
atingi unua la tagon,
kaj vi distriĝus en pensoj,
atendu la Tempon,
ĝi vin atingos.*

BOHEMO

*En mallumo
mi forĵetas kun malŝato la sunon
de la etenditaj manoj.
Disipite
sur la strato kuras la fiero,
piedpremante ĉion
en la sombro,
lacigite miajn paŝojn mi kolektas
kaj arigas miajn pensojn.
Sur la kaj' kolektas mi parolojn
forlasitajn de l'infanoj.
Mi postrkuras la matenon,
kiu batas furioze mian sombron.
Miaj okuloj malhelaj
timigite forflugas
kun la mevoj.*

NOVJARA SONGŔO

*De nigraj pensoj
nigraj okuloj
sorbas la nigron de l' nokt'.
Lumas lamparo
por novaj deziroj.
Miaj proksimuloj delonge jam
forlasis la ĉielon
(vane nombris mi ĝis dek).
Nigraj okuloj
nigrajn larmojn verŝas,
nigran kaptukon metis mia patrino,
triste
pro mi sonoriloj nun sonas.*

NOVJARA

*Ĉi-nokte
dum verŝiĝas vino
kaj kanto ĝoja ĝis la steloj
flugas,
dum la am' senfine
sin elverŝas
el ĉies okuloj,
anstataŭ la lipoj
dum la rigardo parolas,
haltigu la tempon
flugantan,
kaj donu al ĝi ebriiĝi,
ke ĝi forgesu
la vojon
al la tago
juĝa,
kiu nin atendas.*

TRISTA

*Trista estas la kanto
de la vento,
kiu sur la tomboj
distrenas la tagon.
Kaj la penso trista estas,
dum sin trenas en la koto
pene
kaj tretas la Honoron
falintan el la poŝo.*

SEMAJNFINA VEKIĜO JE LA 6-a MATENE

*Hundoj senhejmaj
patriote humoraj
miajn paŝojn disŝiris,
dum ili mediteme
promenadis sur la neĝo.
La malluma strato
ilin helpas
bremsante la paŝadon.
La pordoj furiozaj
trakuras la sonĝon.
La sonĝo trenas per maniko min
senfortan,
min faligas kaj hundoj min mordas.*

*Kaj tiel ĉiunokte
mia inkubsonĝo
denove komenciĝas.*

IKARO

*De ĉiuj forlasita
mi konfuzas surstrate
la paŝojn.
Kaj en la nomo de l'feliĉo
ĉi-matene
dum hundoj diŝjetas
la rubaĵon,
al mi
kaj al la rubaĵistoj
nur la larmoj
reiras
por lavi la animon.*

*Malesperiĝinte
mi la hundojn envias.*

SUBLIMA AMO

*Mi amas la homon,
dum rampas antaŭ mi,
mizera vermo estas li,
kiu en la viv' sin trenas
kaj sinkaŝe
inside
vin perfidas.*

*Mi amas la homon,
dum en polvo kuŝas,
li rubaĵo estas,
balaĵo,
kies animo fetoras,
ĉar malgraŭ veinda
en ĝardenoj paradizaj
li transdonus la fetoron,
kiu portas li en si.*

*Mi amas la homon,
la povran estaĵon,
kiu timigite de l'vivo,
rifuĝas en sonĝojn.*

*Li mensogas,
li fuĝas de l'angoroj,*

*anstataŭ batali,
en la mond'
polvero — kiu vent' forportas.
Mi amas la homon,
eĉ kiam li sin malamas,
eĉ kiam li gloras
en alte levita mano
sangan ponardon,
mi rigardas
ĉi — homon
kaj KREDAS.*

SKOPJE

*Sur la arboj korvoj grakas.
Pendigitaj
nuboj da fumo super la fumbuboj
kun bluvizaĝoj
falas
sur dorsojn de preterpasantoj.
Super Vodno
la sun'
sufokita de nubo venena
mergiĝas uesten.
Kun sangaj okuloj
drinkulo
serĉas en botel' feliĉon.
La infero malfermas aperte la pordojn
kaj la aŭtomobiloj impetas
forpelante promenantojn.*

*Loko por lumo ne estas
en la okuloj de l'pesimistoj.
La nokto
absorbas la ombrojn.*

POSTPAROLO

La homo estas soleca ekde sia naskiĝo. La amo estas maniero eviti ĉi tiun solecon, ĝi fakte estas lasta ebleco, lasta ekkrio de la homestaĵoj. Aliflanke la soleco estas samtempe specifikaĵo de ĉiuj estaĵoj sur nia planedo. Ni naskiĝas tute dividitaj en nia izolita miniatura mondo, nekapablaj ĝis la morto penetri en alian estaĵon, pri kio eĉ ne ekzistas ŝanco.

Mi sentas min senpova pro tio, sed ĝuste tiuj ĉi demandoj de la vivo kaj de la morto, kaj kune kun ili ankaŭ de la amo — pri kiu plej multe oni povus skribi kaj paroli — min okupas en mia poezio.

La aŭtoro

Enhavo

ANTAŬPAROLO	3
1. IO PRETERPISIS MIN	7
TROVAĴO	7
IO PRETERPISIS MIN	8
SPEGULO	9
PRIPENSITA ŜILDO "PEGAZO KAJ INFANO"	10
INFANECO	12
PRINTEMPO	13
FLUGO	14
NIGRAJ BIRDOJ	16
INFANOJ	17
SAMSPECAJ ANIMOJ	18
IDOLANA KREDO	19
MIA FILINO	20
MI KAJ ĜI	21
POST LA DILUVO	22
LUNO	23
MALBONA KOMERCISTO	24
NEFINDIRITA	25
REKVIEMO	26
JAM VIDITA	27
ANTAŬDORMA REZONADO	28
PROMESO	29
ĈIELARKO	30

OKULOJ	31
MATENO	32
SE MI EKIRUS ĈI-NOKTE	33
KONFESO	34
2. NOKTO SEN RIPOZO	35
NOKTO SEN RIPOZO	35
AMO	37
VIRINO	39
ĜOKONDA	40
KANDELO	41
MUROJ	43
HAIKU — PENSOJ, TROVITAJ EN SKOPJE	44
TEMPO	45
MI NE KREDAS SONGŔOJN	46
EĈ LA SONGŔOJ KONTRAŬSTARIS MIN	48
3. SUBLIMA AMO	49
LOGRAJTO	49
SOLECA KANTO	50
SUNSUBIRO	51
SE VI RAPIDUS	52
BOHEMO	53
NOVJARA SONGŔO	54
NOVJARA	55
TRISTA	56
SEMAJNFINA VEKIĜO JE LA 6-a MATENE	57
IKARO	58
SUBLIMA AMO	59
SKOPJE	61
POSTPAROLO	62

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-146-1